



Haltigi la impostan escepton pri aviadila benzino en Eŭropo.

Aviadilaj kompanioj pagas neniun benzinan imposton. Tiu imposto ne aplikiĝas sur flugbiletoj. Karbonaj emisioj de flugado en Eŭropo altiĝis je 21% dum la lastaj tri jaroj. Finfine alvenas tempon por haltigi tiun impostan escepton. Subskribu tiun eŭropan civitanan iniciaton registrita ĉe la eŭropa komisiono por igi moveblecon en Eŭropo pli justa kaj pli daŭrigebla. Laŭ nacieco, vi eble bezonas vian identecan dokumenton aŭ vian pasporton.

Klimata ŝanĝo, kreskanta aerpoluado kaj aviadilaj brulaĵoj kreskas ĉiujare. Flugbiletaj prezoj estas tre allogaj pro senpravigeblaj impostaj avantaĝoj por la aviadila industrio, dum trajnaj biletoj estas pli multekostaj. Vi ne estas la sola, kiu estas surprizita pri tio. Pro tio, ni lanĉis tiun eŭropan civitanan iniciaton. Estas unika vojo por civitanoj alvoki la eŭropan komisionon fari leĝan proponon. Se la iniciato kolektas unu milionon da subskriboj, la komisiono estas formale invitita por ekagi kaj proponi politikon al la leĝdonantoj.

Fakte la aviadila sektoro profitas maljuste de avantaĝaj impostoj dum estante la plej karbona intensa modo de transporto. Tiu situacio maljustigas konkurencon pri la trajnoj kiuj, malgraŭ sia ekologia efiko, estas tre impostitaj.

Dum la aviado estas unu el la plej rapida kreskanta fonto de karbonaj emisioj, keroseno restas senimposta. La entrepreno de malalta kosto Ryanair iĝis la deka pli infektanta kompanio en Eŭropo en 2018. Eŭropa komisiana raporto rivelis ke krei imposton reduktus la aviadajn emisiojn de 11% (16,4 milionoj da tunoj de karbono) kaj havus neniun efikon sur laborpostenoj aŭ ekonomio entute dum levante preskaŭ 27 miliardoj da eŭroj en enspezoj ĉiujare.

Nia eŭropa civitana iniciato petas finon de la escepta pozicio de la aviada sektoro en Eŭropa Unio, kiu finance subtenas la uzon de aviadiloj anstataŭ trajnoj, eĉ por mallongaj distancoj. Tio signifas enkonduki imposton sur aviada keroseno por la EU-flugo. Ni proponas la fiskal uzon por financi la necesan transiron ĝis daŭrigebla Eŭropo.

Igi la mondon pli daŭrigebla postulas pli ol nur vortojn, do vi povas komenci agi hodiaŭ! Ni alvokas la eŭropan komisionon por prepari ambician politikan proponon por ĉesigi la kerosenan escepton! Por ke la EU ekagas, ni devas rete kolekti milionon da subskriboj. Landoj kiel ekzemple Usono, Kanado, Brazilo kaj Japanio jam havas lokan kerosenan imposton.

Subskribu la peticion ĉi tie: <https://eci.ec.europa.eu/008/public/#/initiative>

Ni levu niajn voĉojn por postuli la necesan transiron al daŭrigebla movebleco en Eŭropo! Ni uzu la kerosenajn fiskalajn enspezojn por financi esploron kaj disvolviĝon de pli daŭrigeblaj motoroj, kaj ĉefe, en la disvolviĝo de fervojoj, precipe tansnaciaj fervojaj retoj.

**Tio povas esti la unua angulŝtono al pli verda Eŭropo!
Ni atendas vian subtenon por subskribi la peticion kaj dividi ĝin.**

Por pliaj detaloj pri nia projekto kaj trovi niajn fontoj, rigardu la sekvan ligilon (angla lingvo):

<https://www.endingaviationfueltaxexemption.eu/>

Subskribu la peticion ĉi tie: <https://eci.ec.europa.eu/008/public/#/initiative>

Contact: kerosene.eci@gmail.com
[@kerosenetax_EU](#) and [#fairosene](#)

Facebook: Ending the kerosene tax EUxemption Twitter:
Instagram: [eci_kerosene](#) and [#fairosene](#)

Modesta esperanta traduko far la komisiono Esperanto Lingvoj de EELV <https://esperanto.eelv.fr/>